Jaro IV. Junio-Julio 1923. Numero 10—11

BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO: por Bulgarlando 30 levoj por fremdlando bonvalutaj 60 lv., malbonvalutaj 40 lv.

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

АБОНАМЕНТ: за Бжлгария 30 л. Обявления: кв. см. 2 лв, Отделен брой 3·50 лв.

Препоржчано от Мин. Нар. Пр. за учил. библ. с окр. № 1870 от 27. ян. 1922

Al Tirnovo!

Dekan fojon la bulgara esperantistaro kunvenos dum julio j. k

Dek kongresoj alterne formas tiun ĉenon, kiu vidigas bilde la marŝon de la bulgara Esperanto-movado.

Ni esperu, ke la deka estos fidela bildo de nia forto kaj per ĝi ni inde fermos la epokon de la unua deko da konrgresoj.

La esencaj taskoj de niaj kongresoj estas:

kunvenigi kaj interrilatigi tiujn, kiuj laboras por Esperanto.

konstatante kaj revizante la agadon dum la pasinta jaro, solvi la aktualajn problemojn pri la organizata propagando;

manifesti nian ideon antaŭ la vasta publiko;

unuigi la diversajn specialistojn, kiuj en fakaj kunsidoj povos interŝanĝi ideojn kaj organizi laboron per kaj por Esperanto; en la kampo de sia specialeco.

En diversaj kongresoj ĝis nun dominis diversaj el la diritaj taskoj.

La nunjara kongreso, konforme al la nuna stato de la movado, devas sufiĉe vastigi sian laboron kaj solvi — kiom estos eble — ĉiujn suprenotitajn taskojn.

Tio multe dependas de la amasa partopreno de bulgaraj esperantistoj en la kongreso.

Fakto ĝojiga estas, ke ankaŭ samideanoj el la najbaraj landoj — Jugoslavio kaj Rumanio — promesis viziti gaste nian dekan. Tiamaniere nia festo havos pli internacian, pli esperantan aspekton, kaj niaj laboroj — pli da intereseco kaj diverseco.

Samideanoj! Preparu vin por la kongreso! Venu amase!

ADA.

P e n ĉ o S l a v e j k o v.

Kanto por profanoj

Babila bruo sur la vendoplac'. . .
Abul—Hasan' tra homa la malpac'

Kun mallevita kap' maskite vagas,
Aŭskultas onin kaŝe. Tuj alsagas

Orelon lian voĉ' de babilul'
El unu malproksima placangul'.

Al homamaso kun voĉego kria
Parolis jen softa' kun cerb' ebria;

„Dolĉegaj — kantoj de Abul Hasan'!
La rimoj ŝprucas kvazaŭ el fontan'.

Rilate belon — estas li senpeka
Sed — unu: mankas al li senco veka".

Deiris kun konfuz' Abul Hasan'.
Sed al aliaj homoj sub platan'

Starantaj tre atente — grave, saĝe:
S o f t a' alia kriis pli kuraĝe:

„Belegaj — kantoj de Abul Hasan'!
Ilia senc' — senfunda ocean',

Kaj hom' legante ilin, ĝuon sentas —
Sed — forma malperfekto evidentas".

Abul Hasan' rigardis lin sen dir,
Deiris, sed rehaltis li kun mir'

Ĉe tria grup'. Svingante larĝe manon
Alia hom' kritikis jen Hasanon:

„Ĉarmegaj — kantoj de Abul Hasan'!
Profunda senc' kun rima akompan'

En ili estas arte kunmiksita,
Sed unu: mankas al li la ekscito".

Aŝik' Abul' Hasan' ekmiris tro.
Sed tuj manon kaptis de l'hero'

M o l l a' ridanta, kiu je l'orelo
Alflustris al Hasan sub la ombrelo:

„Sorĉpovaj — kantoj de Abul Hasan'!
„Kaj ne komprenos ilin la profan'",

Sed tiu nur, en kies koro brilas
Ĉiela flam', al Dia kre' simila,

Kaj kies kor' talentas mem je kant'. —
Kantanton povas koni nur kantant'

Kaj ne vendplaca ĉiu hom ' blasfema,
Je kantoj surda haj nekomprenema.

Hasano kantas kantojn; sed la scio
Ke ilin fikomprenos la socio —

Lin igus ilin forbruligi tuj...
Vendplacaj kritikistoj! El fajruj '

Nur polvon en okulojn ili ŝovas
Al popolaĉ'! Nur fanfaroni povas

En templo de la art '!" — Abul Hasan
En miro restis. Dume kun turban '

Maldekstren kliniĝinta la m o l l a ' foriris.
Li mem ĉi tion foje al mi diris.

Panagjurište, marto, 1921. trad. St. Guĝev.

Zamenhof en bulgara traduko. — Заменхоф в бжлгарски превод.

Mia penso.

Sur la kampo, for de l' mondo,
Antaŭ nokto de somero
Amikino en la rondo
Kantas kanton pri l'espero.
Kaj pri vivo detruita
Ŝi rakontas kompatante —
Mia vundo refrapita
Min doloras resangante.

„Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro,
Kial tia senmoveco?
Ha, kredeble rememoro
El la kara infaneco?"
Kion diri? Ne ploranta
Povis esti parolado
Kun fraŭlino ripozanta
Post somera promenado!

Mia penso kaj turmento,
Kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
Al vi iris jam oferoj!
Kion havis mi plej karan —
La junecon — mi ploranta
Metis mem sur la altaron
De la devo ordonanta!

Fajron sentas mi interne,
Vivi ankaŭ mi deziras;
Io pelas min eterne,
Se mi al gajuloj iras...
Se ne plaĉas al la sorto
Mia peno kaj laboro,
Venu tuj al mi la morto,
En espero — sen doloro.

31. V. 923 г.

Моята мисжл.

От световний шум далече,
на полето в лятна вечер,
дружка пее за премежди,
за покрусени надежди
и мечти непрежалими,
за разбита радост цветна —
мойта рана многолетна
пак струй кржв и боли ме!

„Спите ли, о господине,
що за неподвижност сжнна?
Спомен може би прозвжнна
из младежките години?"
Що да сторя? Жизнеярко
можех само да говоря
сжс отджхваща другарка
след разходка, в преумора.

О, терзана мисжл моя!
Скжрби тжжни в дните мжртви!
О, надежди! — колко жжртви
вам поднесох аз в покоя!
Свойта младост во разцвета,—
дар най-свиден, — аз тжжовен
сложих пред олтаря светжл
на свещенний джлг вжрховен!

В гржд усещам пламжк вечен,
и аз искам да живея
нещо гони ме далече,
с веселяци ли се рея...
Ако ли сждбата горе
найде пуст труда ми земен,
нека дойде смжрт по-скоро
сред надежди да ме вземе!

Прев. Ив. Добрев.

Bulgara popola humoro.

Unufoje bulgaro demandis sian amikon turkon:

— Kial vi, la turkoj, razas viajn kapojn?

La turko post mallonga silento, respondas:

— Car la vojo al la paradizo pasas tra densa arbaro, kaj longa haro interligus sin al la arboj kaj oni restus tie, ne povante iam vidi la paradizon.

La bulgaro, ĝojigita de la respondo, diras:

— Ho, kara amiko, de nun mi plu ne sole neniam razigos min, sed mi ankaŭ ne tondigos min...

— Verŝajne vi ne deziras esti en la paradizo? — diras la turko al li.

— Pro kio do mi irus en la paradizon, se ĉiuj hanamoj*), havante longajn harojn, ironte al la paradizo restos en la sama arbaro?...

Lodi.

Tio ĉi vin atendas?

(Se ne estas vero, ankaû ne estas mensogo).

Rakonto de Hr. Botev.

Monon, monon, monon! estas dirinta iam Napoleono I kaj estis malferminta buŝon por engluti la tutan mondon; monon, monon, monon! — diras niaj bukureŝtaj popolaj bazirgenoj [1]) kaj strečas la orelojn por aŭdi, kie kaj kiu mortos, por ke ili enbuŝigu lian havaĵeton; monon, monon, monon! — diradis nia kir [2]) Miĥalaki kaj estis ĉorbaĝio[3]). La mono estas saĝo, la mono estas sentoj, la mono estas vivo, la mono estas dio. Por mono Genoviĉ estas iĝinta spiono, Najdenov—lakeo kaj Miĥajlovski — malnoblulo [4]) — nur niaj bukureŝtaj patriotoj ne laboras por mono en la kafejo, sed por ke digestiĝu la manĝaĵo en ilia stomako. Sed el ĉiuj ĉi oraj bovidoj, inda por nia profunda estimo kaj por nia alta atento estas kir-Miĥalaki. Kaj lia sortfeino estas komuna por ĉiuj „grandaj" homoj, lia sorto estas pli tragika ol la Don Kihota.

Ni staras en la antaŭ vespero de Ĉieliro kun avo Obreŝko Kartunkoviĉ sur la strato kaj rigardis, kiel la infanoj ludas je „forno-forno-forneto". De malsupre venas kir-Miĥalaki kaj irante, la muroj ŝajne diras al li: „brave, brave! granda homo, saĝa homo". Kaj granda kaj saĝa homo estis kir-Miĥalaki: lia ventro — ja kiel vi povus fari tian ventron — eĉ se vi kunigus

---

*) Hanamo — turka virino.

[1]) Ofenda nomo de la komercistoj Rim. tr.

[2]) Kir — greka vorto, signifas sinjoro. Rim. tr.

[3]) Corbaĝioj — riĉa klaso de la bulgaroj dum la turka jugo; la ĉorbaĝioj ordinare estis proksimaj al la regantaj turkoj, influantaj antaû la administraj organoj. Rim. tr.

[4]) Botev aludas pri liaj samtempuloj, pikante ilin satire. Rim. tr.

la ventrojn de la ses bukureŝtaj ĉorbaĝioj, kvankam ili estas formanĝintaj pli da popola havaĵo; lia kapo — kvin tiaj, kian havas „nia doktoro", kvankam la lasta estas profesoro „de la bukureŝta medicina fakultato" kaj kun sia ĉevala saĝo estas miriginta kaj grandularon. La kapoj kaj ankaŭ la ventro de kir-Miĥalaki estis troveblaj en neniu bestbuĉejo. En lia ventro povus libere sidiĝi kvin turkoj kaj trinki kafon; en lia kapo vi povus kovsidigi anserinon kun tridek ovoj, kaj lia brusto — ja bruston ne havas niaj ĉorbaĝioj. La vizaĝo de kir Miĥalaki similas je panbaka kloŝo, la nazo — je ŝimiĝinta beraro, la manoj — liajn manojn oni ne povas vidi rigardante de antaŭe; kaj la piedoj — nur el liaj piedoj oni povus elfari 5—6 pastrojn. La malantaŭĵo de kir - Mihalaki estis iom pli delikata: lia kolo — kiel la talio de porko, lia dorso — ronda monaĥeja manĝotablo.

— Forkuru be-e-ej! forkuru! la ĉ o r b a ĝ i o venas! — ekkriis unu el la buboj, ekvidinte kir - Miĥalaki' n — turnis kalkanojn kaj forkuris kvazaŭ brogita. La infannoj — unuj forkuris, aliaj kvazaŭ konsternitaj algluis sin al la muroj, fingreekgratis siajn nazojn kaj time atendis la trapason de la vilaĝa bovoviro. Kaj kir-Miĥalaki kun plenblovita ventro simile je velo, naĝas kaj naĝas! „Ih! se iu elpikus per brulligno vian unu okulon vi eksimilus je ciklopo", — mi diris en mi; ĉar ĝuste tiam mi studadis la grekan mitologion. Sed antaŭ ol iru manetendus por trapiki la okulon al kir-Mihalaki — kir-Miĥalaki mem manetendis kaj kaptis unu bubon je la orelo. — „Azenoj tiaj..... ĉu por vi preĝejo ne ekzistas, ha? Nu, vi iru por preĝi dion por viaj gepatroj". — Ole-le! onklo Mihalaki, vi forŝiris mian oreleton!" ekkriis la bubo kaj kurbiĝis tiel, kiel li ne estis kurbiĝinta eĉ en la manoj de sia instruisto. Kir-Mihalaki lasis la bubon kaj forkuriĝis ĉiujn nudkapulojn, por ke ili iru preĝi dion.

„Tiel ja Napoleono estas tirinta la orelojn de l' popoloj ĝis kiam, plej poste, ankaŭ oni lin kaptis je la orelo kaj kondukis por preĝi dion sur la insulo Sankta Heleno" — mi ekpensis tiam. Sed ankaŭ nun ja estas tiel: la mondo ŝajne, estas farita, por ke oni unu alian tiru je la oreloj. Kaj ekrigardante la orelojn de la bulgaroj, al mi ŝajnas, ke ili estas tre grandaj: preskaŭ-preskaŭ azenaj.

— He, Koljo, kial vi forkuris, kiam vi ekvidis la ĉorbaĝion? — demandis avo Obreŝko la bubon, kiu estis jam reveninta kaj saltetis antaŭ ni kun peco da sekala pano en sia mano, de kiu demordante, li viŝadis samtempe sian nazmukon.

— Mi foriris ĉar li tiras orelojn.

— Ja kial li tiras ilin?

— Ĉar li estas ĉorbaĝio.

— Kaj kial li estas ĉorbaĝio?

— Nu—ja—nu? Ĉar li havas monon.

— Sed, se li ne havus monon, ĉu vi ne estus forkurinta?

— E-he! Ke mi forkuru? Ja, mi prenus tiam la bastonon de mia patro, por ke lin irigu al la marĉo por trinkigilin, diris la bubo, sed, ĉirkaŭrigardinte, tuj ekkaptis la randon de sia pantaloneto kaj oni nek vidis, nek aŭdis plu lin. Mi ekrigardis: la vento sin turnis de la alia flanko, kaj la vento ektrenis kir-Mihalaki'on en la malan direkton. Kir-Mihalaki marŝas, kaj kun li ankaŭ marŝas la edzino de Mito Ĉengeljat kun suĉinfano en siaj manoj kaj kun ankoraŭ kvar aliaj infanetoj post si, ornamitaj per la tuta lukso de l' malriĉeco kaj unu ol alia pli malindaj. Ĉengelka (Ĉengel-edzino) ploras kaj Kir - Mihalaki ekridetas sub lipharoj.

— Mi petas vin, kir-Mihalaki, havu kompaton je dia nomo — liberigu Miton el malliberejo. Pro 30 groŝoj tutan monaton jam li estas tie kaj mi—sola virino, — kion mi faru? Tiom da infanoj, kaj eĉ peco da pano ne estas hejme... depost hieraŭ ili ne estas manĝintaj...

— Sed ja mi cin ne instigis naski tiom da infanoj. Malriĉuloj vi estas, vi devis — fari ekonomion (ŝparon).

— O-oh, ne diru, kir-Mihalaki, kian k u m a n i o n *) (ŝparon) fari, ja la k u m o (baptopatro) estas pli malriĉa ol ni? Por vestoi, por kandelo, por ĉi tio, por tio, ĉiam ni elspezadis. Nur la pastro — al la diabloj lia pastreco nur li prenis de ni 9 groŝojn pro bapto. Kaj kun 30 groŝoj kion pli frue? Ni delonge estus pagintaj al vi tiun ĉi monon, sed jen: la azenon surpremis la argilo, la porkon oni mortigis en via ĝardeno, kaj la kokinoj, se vi ne kredas, venu vidi — ĝis la lasta mortis pro la pipso... Ne estas, ne estas de kie mi prenu: unu ĉeno kaj unu litkovrilaĉo est.s restintaj, kaj ilin mi alportis en vian domon... Mi ne scias jam kion fari!

— Tio ne estas mia afero. Milfoje mi diris al ci: alportu al mi 30 groŝojn kaj prenu la litkovrilaĉon, kaj la ĉenon, kaj la edzon... Se ne—nu, defol burdan *): — Se ci amas cian edzon, iru kaj loĝu kun li en la azena paradizo. — Mi diras al ŝi fari ŝparadon-ŝi babilas al mi, ke la baptopatro, la pastro kaj la azeno estas kulpaj! Ĉarlatanino tia! monon se ci ne havas, ĉu vi ne havas almenaŭ cerbon en cia kapo? Komprenu kion mi diras al vi.

— O-oh, oh! Kompatu min, Kir-Mihalaki, kian monon kaj kian cerbon vi volas de virino? Kiu havas en la monujo,

---

*) Ludvorto: la neklera virino miksis la etimologion de l' vorto e k o n o m i o (parolata de ŝi erare k u m a n i o) kun la bulg. vorto k u m = baptopatro. R. tr.

*) turke: for de tie ĉi.

tiu havas ankaŭ en la kapo, sed mi? Ho-ve, ho-ve, al mi kun tiom da infanoj!...

—Ha! pro tiu ĉi babilado — „dio absolvu!“ Pro tio ja mi diras al ci, ke mi bezonas monon-monon-mono-o-on? Alportu 30 groŝetojn — kaj mi liberigos vian edzeton — ĉu ci komprenis?

— Mi komprenis... apenaŭe kdiris Ĉengelka kaj per la rando de sia tuko komencis viŝi siajn larmojn. Kaj Kir-Mihalaki eltiris sian tukon el sia ĉebrusto kaj visis la ŝviton de sia belega vizaĝo. „Senfortigis min tiu ĉi malbenita virino“ ekĝemis li, kaj ekiris post sia ventrego.

— Ke mono briligu vian hepaton! Ke la ĉenon, kiun vi prenis de mi rusto formanĝu ĝin sur via kolo!“ Kaj kun mia kovrilaĉo vian mortintportilon oni kovru! — ekkantis aŭ tutegale, ekploris Ĉengelka post Kir-Mihalaki kaj eniris en sian hejmon por kolekti herbaĉon kaj nutri siajn infanojn.

* * *

— Nu, avino, kial vi ne estingas tiun ĉi malbenitan sanktlampeton, ĝi ja lumas al la katino ŝi gratas sur la mato, kaj al mi malhelpas ekdormi?

— Peko estas, filo, kiel mi ĝin estingus, ja dum tiu ĉi nokto ĉieleniros la Sinjoro?

— Mi ja pensis, ke ci ĉieleniros; — mi vidas, ke ci jam eksimilas je koboldo.

— Eh, se mi havus tian feliĉon! Kiu estas senpeka kaj pia, nur tiu ĉieleniras; kaj mi — kiajn bonfarojn mi faris?

— Estingu la kandelon — jen estas unu bona faro. Noktomezo jam estas, la Sinjoro devas esti ĉielenirinta.

— Kaj ja, ĉu mi scias? Se estas ĉielenirinta, tiam mi ĝin estingu, kaj morgaŭ denove kaj pli frue mi ĝin ekbruligos, ja!

Mia avino stariĝis por estingi la kandelon, sed ĝuste kiam ŝi etendis la manon tuj ekpafis 5—6 pafiloj ie proksime en la kvartalo kaj ŝi restis kvazaŭ ŝtonigita. La pafiloj ree ekpafis kaj krio „jurja! jurja!“ traflugis la tutan kvartalon. Mia avino komencis signi krucojn kaj fari riverencojn.

— Avin-o-o-o, la Sinjoro ĉieleniras, — ĉu vi aŭdas?

— Silentu ci! Kia Sinjoro? tiuj estas banditoj.

Kaj la pafiloj pafadas kaj krioj fendas eĉ la ĉielon.

Pardonu mi-i-n! pardonu, bonaj homoj! pereas mi jam!“ — ekmuĝegis la gorĝo de kir-Mihalaki. — Ĉu vi aŭdas, avino? Kir-Mihalaki ĉieleniras, ĉu vi aŭdas? La anĝeloj lin trenas sur la monton. — „Silentu, ci aĉulo, pri kiaj anĝeloj vi pensas? Tio ĉi estas rabistoj. Pereis la bona hometo“.

— „Mi petas vin fratoj! Mi petas vin, kiel Dion, ne pereigu min! Kvin infanetojn mi havas...“ — krias kir-Mihalaki, sed tiel, kvazaŭ li dronas. — Mi ne igis vin, naski tiom da in-

fanoj" — respondas sankta ĉefanĝelo, kaj la ponardoj senŝpareme klakadas sur la dorson de kir-Mihalaki. — „Ĉieleniro! — Avino-o-o-o! Ĉieleniris jam li — nu estingu la sanktan lampeton. Kaj vere, mia avino ne estis tiel stulta: ŝi komprenis, ke ne la Sinjoro ĉieleniras, sed kir-Mihalaki, kai pro timo, ke la anĝeloj eble vidus ŝin kaj venus por ĉielenirigi ankŭ ŝin ŝi estingis la sanktan lampeton kaj eniĝis sub la kovrilon por preĝi tie al dio. Kaj, gloron al dio, la katino ĉesis grati sur la mato kaj mi ekdormis.

La sekvantan tagon, je Ĉieliro Krista, la tuta urbo fest is la ĉieliron de kir-Mihalaki. Unuj parolis, ke ili vidis, kiél la anĝeloj ĵetis sur lian kolon ĉenon kaj metis sur lian kapon kronon — varmegigitan subkaserolan tripiedaĵon aliaj konigadis, ke kir-Mihalaki jam estas sanktiĝinta kaj en la paradizo kun la filoj de dio li manĝas panbrogaĵon; kaj triaj predikis, ke la anĝeloj suprenportis ankaŭ tri sakojn da mono; kaj tio ĉi ne ŝajnas esti mensogo, ĉar ja Dio, estante ĉorbaĝio, sen mono li apenaŭ havus saĝon. Sed mi scias nur tion, ke je ĉieliro Ĉengelka ekbruligis antaŭ la figuro de sankta Mina vakskandelon por 10 paraoj, sed ĉi tion ŝi faris pro ke ŝia edzo ne estis jam en la malliberejo. Kir-Mihalaki per mono sin deaĉetis ankaŭ de dio. Post unu tuta monata malliberiĝo, ne en la azena, sed en la dia paradizo, kir Mihalaki revenis, sed nur sen mono, sen saĝo kaj kun nomo ŝanĝita de ĉorbaĝi kir-Mihalaki je M i h a l.

Kaj ekiris Mihal por rakontadi al sia subulantaro pri sia ĉorbaĝieco kaj pri sia ĉieliro, kaj la infanoj jam ne forkuras de li, sed alsaltas unu el ili antaŭ li kaj lin piketas sur la ventron kaj diras: kion havas tie ci Mihal?' — Mihal respondas... kaj kiam ĝin vi estas enmanĝinta? Kiam estis ĉorbaĝio ĉu ne? Kaj alia infano malantaŭe salivumas sian fingreton kaj rapidkurante puŝas la corbaĝion. Avo Obreŝko, ridas, ridadas kaj diras: ne sufiĉas al la azeno la skabio sed ankaŭ la muŝoj ĝin mordas.

Plovdiv. Tradukis. K. Mateev.

Преподаването на Есперанто в нашите гимназии.

И тази година в нашите гимназии се преподава Есперанто като факултативен предмет. Но до колкото имаме сведения, почти в никоя гимназия той не е поместен в програмата за предобедните часове. Това е едно голямо неудобство за учениците, дето те трябва да се явяват повторно в гимназията след обед, като губят време за отиването си до

---

*) Egalaj je 5 centi moj. La Trad.

кновения говор интернационални думи, като telegrafo, telefono, lampo, maŝino и пр., а също и славянско-българските думи: gladi. suĉi, gasto, vidi[1]), nepre и др. Това има тройно значение: 1) начинающия още при първата стъпка добива впечатление за леснотата на езика, 2) вниманието му бива заето само с външната, техническата, азбучната страна на думите без да има нужда да се напряга паметта за запомняне и превеждане смисълът им и 3) намирайки в Есперанто думи от матерния си език, начинающия се прониква с чувство на някаква близост към него, който не му се вижда така чужд, както френски, немски и др. несродни с българският езици.

От познатите думи могат да се съставляват също и лесни изречения, почти не нуждающи се от превод, като напр.: Per la gladilo ni gladas.

Ето защо считам, че е неудобно още при първият урок, преди още учащия да разполага с каквито и да било познания по граматиката на езика, да му се дават за заучване прозаични или поетични текстове със съвършено неизвестни странни думи. Ако стане нуждно да се даде на начинающите представа за звучността на езика, то нека лекторите и ръководителите направят това чрез прочитане на отбрани стихотворения или прозаични текстове.

IV.

За да може от уроците да се добият не само познания за граматиката на езика, но и достатъчно думи и изрази нужни за обикновения говор, то необходимо е уроците да засягат по възможност повече области от живота. Затова трябва да се избягват дългите текстове от откъслечни примерни изречения, като за сметка на тях и след тях в урока се поместват цялостни четива, засягащи разни житейски области, като напр. „La homa vivo kaj la sezonoj“, „La kvin sentoj de l'homo“ („Есперанто в 10 урока“) и др., които от една страна ще служат за изучване граматиката, а от друга — ще създадат добър материял за беседи и разказване.

Освен това, за да може учащият, а особено самоучащтият езика, да привикне да схваща прямия, съществения смисъл (значение) на есперантските думи и за да вникне по-добре в строежа и духа на есперантската реч, мисля, че добре е, а

---

[1]) Бел. Ред. Автора погрешно схваща, че думите gasto и vidi са взети направо от славянските езици; в същност те са в известна степен международни (немски Gast, лат. video); разбира се, това не обезценява мисълта му, да се дадат в първите уроци думи, познати на учащите.

даже и необходимо е, горепоменатите цялостни четива в пжрвите няколко урока да бждат преведени по вжзможност буквално на бжлгарски, каквито статии се дават в „Bulgara Esperantisto“.

V.

А за да може още от началото да се сждаде веселост, живост при изучването, а особено в курсовете и класовете, нужно е още от 3.—4. урок след поменатите цялостни четива уроците да сждржат в края си и кратки хуморески, които сжщо ще послужат за разговор и цялостно вжзпроизвеждане.

Тжй че схемата на един урок според мен трябва да бжде следнята:

1. Граматически обяснения: правила и примери, както в учебника на г. Атанасов.

2. Кратко ekzerco: от есперантски и бжлгарски текстове за превод, сжстоящи се от откжслечни типични примери (изречения) за приложение на правилата. Добре е ако поне, някои от изреченията могат да се свжржат в обща мисжл.

3. Цялостно житейско четиво (от 3-ия — 4. урок), което в пжрвите поне 5–6 урока трябва да бжде преведено и на бжлгарски.

4. Кратки хуморески, анекдоти и пр., които кжм края могат да бждат по-джлги.

5. Кжм края може уроците да сждржат и стихотворения, от които добре е някои да бждат преведени и на бжлгарски, пред вид особената структура на стихотворната реч и по-трудното й превеждане.

VI.

След всеки 5 или 6 урока трябва да следва един образцов урок за преговор, а крайния урок да служи за общ преговор. Това е особено важно за самоуците, а не е без значение и за курсовете и класовете, независимо от вещината на лекторите. Без преговор и систематизиране няма знания.

VII.

Всички правила за винителния падеж трябва да се дадат в един или два последователни уроци, за да не се вижда на учащия много сложно и разнообразно употреблението му.

VIII.

След последният урок, учебникжт трябва да сждржа и един разговорник (есперантска фразеология, преведена на бжлгарски) за разни житейски случаи: на гарата, на пара-

хода, в хотела, в гостилницата, в театжра и др. т. Тия фрази се изучват от начинающия още в самото начало с голям интерес, не се забравят лесно и спомагат много за вникване в строежа, духа на езика и за усвоението на винителния падеж.

IX.

Учебникжт трябва да сждржа и кратка христоматийка с отбрани статийки и стихотворения. Статийките желателно е да бждат предимно от житейско-конкретен характер за обогатяване речника на учащия с повече честоупотребяеми думи.

X.

Желателно е, речниците, приложени кжм учебника, да сждржат повече общи и честоупотребяеми думи, а не само сждржащите се в уроците. Особено е нужно, според мен, бжлгарско-есперантския речник да сждржа повече думи, понеже самоизучващият езика, а сжщо и курсистите и учениците, нямайки, като новаци, на разположение пжлни речници, често искат да намерят в приложения речник бжлгарски думи, преведени на есперанто, за да ги употребят в есперантската си реч. А беднотата на речника ги спжва, незадоволява и отчайва, ако не намерят у някого помощ. Тжй че, за да бжде учебникжт и добжр самоучител, нужно е да се приложат кжм него и 2 по-пжлни речници, които, за да не заемат много място, могат да се напечатат с по-дребен шрифт. Подобни речници са приложени кжм учебника на г. Крждстанов.

Естествено, при удовлетворението на тия, а може би и на други още изисквания, които ще бждат изтжкнати от есперантистите вжобще, учебника ще стане по-обемист и цената му ще се повиши, но, струва ми се, тя ще требва да бжде около 20 лв., което не е скжпо за днешните времена.

28. май 1923 г., с. Горско-Сливово.

Г. Желязков.

Кжм коопериране.

Думата кооперация на бжлгарски значи сжтрудничество. Да се кооперират известни хора, да образуват кооперация, това значи да се сжюзят за економическо сжтрудничество, за взаимопомощ.

В борбата за сжществуване изпжква най-важния фактор — взаимопомощта. И ние сме свидетели как навред в природата взаимопомощта се най-широко прилага. За при-

мер на нас хората могат да служат мравките, на чиито общежития можем да завиждаме само. Дори и свирепите вълци, кога падне снег и стадата изчезнат, се събират в глутници за взаимопомощ — коопериpат се. Взаимопомощта е и в основата на човешките общества. Без нея е немислима борбата за съществуване, борбата с природата. Човека сам — не е човек.

В самите човешки общества от друга страна съществува борба. В тая борба, в борба с мощния капитал, слабите жертви на тоя капитал почнаха да се кооперират. И организираната мощ на тези слаби по отделно хорица, е тъй голема днес, че почва да задава страх на всесилния капитал.

В борбата за нашия идеал, ние есперантистите требва да се поучим от живота. Ние требва да схванем добре, че колкото слаби и да сме поотделно, свързани, обединени за сътрудничество, ние ще бъдем сила, чийто глас ще се чува.

Ще каже некой: нали сме свързани в едно дружество? Да, но това е една идейна връзка само. За да имаме сила на земята, необходимо ни е тело — економична организация. И тая именно економична организация е кооперацията.

Явила се в помощ на нашето дело, на нашата идейна организация, тя ще изиграе грамадна рол в движението за международен език в страната ни.

Тя ще бъде здравата економична основа на Българското Есперантско Д-во, от липсата на която до сега последното е било доста спъвано в своята дейност.

Въпроса за създаване на такава економична организация за есперантски нужди е повдиган много отдавна, схващайки значението му за делото. Дори миналата година в София се пристъпи към реализиране на тази идея. По едни или други причини успех не се е постигал. Това не требва да ни обезсърдчава, а напротив, да ни кара по-ревностно да се залавяме за постигането на тази първа цел на нашето движение.

Съзнавайки това, група съмишленици от София, решиха да осъществят тази идея още тази година. Те образуваха новата кооперация, чийто устав е в Софийския Окръжен съд за утвърждение. След като устава бъде утвърден, кооперацията ще почне своята работа. Целта й е да прилага езика Есперанто на практика в търговията, на първо време в есперантското книгоиздателство, като даде на есперантския свет в есперантски превод най-добрите творения на българската литература. Цел на кооперацията е също и

подпомагане финансово движението за международен език в страната ни и на организациите, които представляват това последното.

Посрещната добре, получила подкрепата на целото бжлгарско есперантство, организирано или не, една подобна кооперация има да изиграе най-важната рол в нашето движение в страната ни. Единствена тя е, която може да ни осигури крайната победа. Необходима е, обаче подкрепата, сжзнателна и най-широка подкрепа от от всеки милеещ за Есперанто. Затова нека бжде общ повика всред есперантските среди у нас: Да се коопери раме! Да се сжединим за обща борба! Нека видим ясно, че силите ни са слаби и рискуваме да загинем в световната борба. Временните добри условия, може да изчезнат, може да падне дебел снег и ако ние не сме пригодени за него, ще загинем. Нека образуваме нашата глутница за мирна борба!

Виждайки как тези няколко редове се посрещат с радостни вжзгласи от всички приятели на Есперанто у нас, как те извикват надежда по лицата и готовност за нови жертви и борби, аз още по-високо викам заедно с всички: Да се коопериране!

Д. Симеонов.

Letero el Argentino.

En la pasinta numero de B. E. ni donis eltiraĵon el la letero de unu nia bulgara samideano el Argentino. Nun la sama skribas al unu el niaj redaktoroj novan leteron, el kiu ni eltiras la sekvantajn liniojn:

„. . . Mi ricevis „B. Esperantisto“-n kvankam la adreso estis skribita iomete erare . . . Sed ĉu mi devus sciigi al vi la malgajigan fakton, ke mi estas malsana? Malvarmumiĝis mi kaj elvomis sangon. Jen du monatojn jam mi estas en malsanulejo kaj resano ankoraŭ ne venas,

Писмо от Аржентина

В миналия брой на В. Е. дадохме извадка от писмото на един наш бжлгарски сжидейник от Аржентина. Сега сжщия пише на един от нашите редактори ново писмо, от което извличаме следните редове (превеждаме ги от есперанто):

„...Получих „Bulgara Esperantisto“, макар че адреса беше написан малко погрешно... Ами да ви сжобща ли скржбния факт, че сжм болен? Настинах и повжрнах кржв. Ето два месеца вече сжм в болница, а оздравяване още не иде.

„Hieraŭ min vizitis nia samideano — kunaganto Radion Kolev kaj alportis al mi la pakaĵon, enhavantan B. E. Ĉu vi povas prezenti al vi mian ĝojon kaj kortuŝecon en tiu momento?

„Per manoj tremantaj mi ĝin prenis kaj disfoliumis la gazeton. Mi provis legi, sed nebulo kovris la okulojn, larmoj malklariĝis la literojn . . . jes, larmoj!

„—Ĉu vi estas ploranta? Kio al vi estas? — demandis konsternita mia amiko, kiu min scivole observadis.

„Mi silentis. Io mirinda fariĝis kun mi; la okuloj heliĝis, malfermiĝis mia animo, io dolĉa plenumis mian koron malsanan. Varmega sango disfluis en la tuta mia korpo kaj mi kvazaŭ resaniĝis. Ĉu la balsama forto de Esperanto estis tio?. . .

„Avide kaj soifantanime mi tralegis ĉion; forgesis mi malsanon kaj suferon, vidante la grandan laboron de miaj bravaj samlandanoj. Kaj en tiu stato mi skribis la sekvantajn versojn:

Jes, semantoj ni ja estas,
Fratoj, gloraj sur la tero!
Ni dissemu kun espero
Per la plumo kaj per vorto
Semon de la Esperanto.
Ĉu ja pensas la semanto
Dissemante pri la sorto
Kaj prospero de l' grenero?
Vidu, venas la somero!

„Eble vi estus dironta, ke mi estas poeto? — Tute ne, sed iafoje mi skribis nur por ekzerci mian amatan lingvon.

. . . .

. , ...

„Вчера ме навести нашия сѫидейник-сѫратник Радион Колев и ми донесе пакета, сѫдържащ В. Е. Можете ли да си представите моята радост и трогнатост в този момент?

„С разтреперени рѫце го взех и разлистих списанието. Опитах се да чета, но мѫгла покри очите ми, сѫлзи замѫглиха буквите.,. да, сѫлзи!

— „Плачеш ли? Какво ти е? — запита злисан приятеля ми, който ме наблюдаваше с любопитство.

„Мѫлчах. Нещо чудно стана с мен; очите се проясниха, раз твори се душата ми, нещо сладко изпѫлни моето болно сѫрце. Гороща крѫв се разля по цялото ми тело, и като че оздравех. Дали това беше балсамната сила на Есперанто?...

Сѫс зажаднела душа прочетох всичко; забравих болест и страдание, като видех големата работа на моите неустрашими сѫотечественици. И в това сѫстояние написах следните стихове:

Да, сеячи сме ние.
Братя, славни сеячи на земята!
Нека сеем с надежда
Чрез перо и чрез слово
Семето на Есперанто.
Та нима сеяча мисли,
Като сее за сѫдбата
И успеса на зѫрното?
— Вижте, лятото веч идва!

„Може би ще кажете, че сѫм поет? — Сѫвсем не, но по някога сѫм писал само за да се упражнявам в нашия любим език . . . .

. . . .

„Mallerta laboro, sed ni lasu tion; mi estas antaŭ la sojlo . . . Jen tie ĉi mi sendas unu peson por la X-a. Donu Dio, ke mi postvivu ĝin! Bonan sukceson! Saluton al ĉiuj kongresanoj kaj plej multe al vi

Cv. Arnaudov.

Ni sias, ke multaj, nekonantaj bone la idean flankon de nia movado, ne komprenos tiun emocion de esperantisto kaj tiun grandan amon al Esperanto, kiu ŝprucas el tiu ĉi letero.

Sed ni, kiuj scias, kiajn momentojn en nia vivo donis al ni Esperanto, ni tre bone komprenas la sentojn de nia samideano kaj partoprenas en ili. Tiu letero estas ankoraŭ unu dokumento pri nia interna forto.

Movado, kiu havas similajn porbatalantojn, certe triumfos!

„Нескопосна работа, но нека оставим това; аз сжм на прага... Ето тук пращам един песо*) за Х-я (конгрес на бжлг. есперантисти). Дано даде Бог да го преживея. Добжр успех! Поздрав на всички конгресисти, а най-много вам.

Цв. Арнаудов."

Ние знаем, че мнозина незапознати добре с идейната страна на нашето движение, не ще разберат това вжлнение на есперантиста и тази голяма обич кжм Есперанто, която блика от това писмо.

Но ние, които знаем какви моменти в нашия живот ни е дал Есперанто, ние твжрде добре разбираме чувствата на нашия сжидейник и взимаме участие в тях. Това писмо е още един документ за нашата вжтрешна мощ. Движение, което брои такива борци, сигурно ще вжзтжржествува!

El la jarraporto de la Centra Komitato.

Dum la jaro 1922-1923 ekzistis en la tuta lando 42 esperanto-grupoj, kelkaj el ili fonditaj je la fino de la jaro. Ĉiuj grupoj havis 881 membrojn. Krome la Junulara Ligo unuigas 200 membrojn, entute en la lando dum tiu ĉi jaro estis 1081 organizitaj esperantistoj. Dum la jaro 1921-1922 la grupoj estis 30 kun 750 membroj.

Ĝis la fino de junio 26 el la grupoj kun 834 membroj pagis la konvenan por la jaro membro-kotizon. Dum la jaro 1921-1922 membrokotizon pagis 22 grupoj kun 550 membroj.

Dum la 1922-1923 financa jaro la Societo havis:

Enspezojn:		Antaŭvidita en la buĝeto	diferenco
de membrokotizaĵoj	5811·50	8000	— 2188·50
„ abonpago . .	14242·50	18000	— 3757·50
„ anoncoj. . .	577·80	100	+ 477·80
„ helpoj por la org.	1703·50	1500	+ 203·50
„ vendo de m. libr.	377·—	1600	— 1223·—
„ aliaj eldonaĵoj	11869.65	—	+ 11869·65
„ aliaj fontoj . .		2700	— 2700·—
Entute .	34581·95	31900	+ 2681·95

Pro la pli frua okazigo de la Nunjara kongreso ni esperas ankoraŭ enkasigi sumojn de la buĝeto por 1922-1923 jaro, precipe de abonpagoj, ĉar la lasta numero de la IV jarkolekto de la organo aperos post la kongreso. Al tio nin kredigas ankaŭ la fakto, ke la organo havis 700 abonantojn kaj pagis sian abonpagon malpli ol 500 personoj. Do ni povas atendi, ke ankaŭ la ceteraj faros sian devon kaj la antaŭvidita sumo eniros en la kason.

Dum la sama periodo la societo havis

Elspezojn:		antaŭvidita	diferenco
Por la presado de la organo	10209·90	12000	— 1790·10
„ ekspedo	793·75	2000	— 1206·25
kancelariaj elspezoj	1500·80	3000	— 1499·20
por kongresaranĝo	560·—	1500	— 940·—
Salajroj	5326·	6000	— 674·—
diversaj	562·—	1000	— 438·—
Certe pagota sumo por la . presigo de 10—12 n-oj de la organo kaj ekspedo. . . .	3760·—		
nericevitaj salajroj	174·—		
entute elspezoj	22886·45	25500·—	— 2613·55

Laû tiu ĉi tabelo nur la elspezoj por la preso de la organo superas la antaŭviditan en la buĝeto sumo — kaŭze de la plialtigo de la prezoj precipe por la lastaj tri numeroj. En tiu cifero estas kalkulata ankaŭ la sumo por la kovriloj de 10-11 numero, kies kosto estas pagita de samideano kaj estas enskribita kiel enspezo en „helpoj por la organo“. En ĉiuj aliaj punktoj estas konstatebla granda ŝparemo.

Ne estas definitiva ankaŭ la cifero pri elspezoj por kongresaranĝo, ĉar ni ankoraŭ ne scias ĉiujn faritajn elspezojn. Certe ili superos la antaŭviditan sumon, sed ne malpli grandaj estos ankaŭ la enspezoj.

La diferenco inter la en-kaj elspezoj — levoj 11695·50 — estas la neta profito por la Societo de ĝia tutjara agado. Tiu ĉi sumo superas la antaŭviditan en la buĝeto (6400) per 5295·50 levoj.

Tiu ĉi fakto povas nur ĝojigi nin kaj nin esperigi je pli bonaj rezultoj dum la venonta jaro. Ĉar la novan jaron la Societo komencos per sia propra kapitalo atinganta la sumon 15637·10 levoj.

De tiu ĉi sumo je 30 junio estis en la kaso levoj 7326. La cetera sumo estas uzita por la II eldono de la lernolibro de kiu la societo ankoraŭ havas ne venditaj 3000 ekz., por la eldono de la broŝuro pri la Venezia konferenco kaj de la kongresaj ilustritaj poŝtkartoj kiuj ankoraŭ ne estas venditaj.

Diversaj personoj: samideanoj kaj lokaj grupoj ŝuldas al la societa kaso 8337·70 levojn por donitaj al ili lernolibroj. La societo siaflanke ŝuldas al samideanoj 10597·20 levojn por donita de la lastaj prunto okaze la eldono de la lernolibro kaj ankoraŭ ne redonita.

La kasa oboroto atingis ciferon 78242·70, kompare kun la pasintjara oboroto (15771·80) ni havas kvinobligon. La tuta oboroto de la Societo superas 230000.

La ciferoj estas tre kuraĝigaj. Kaj kuraĝe kun plenespero ni rigardas al la estonto. La kaŭzoj de tiu ĉi rimarkinda financa progreso de nia malforta societo ne ĉesis kaj daŭros ankaŭ por la venonta jaro, kiu promesas pli bonajn kaj ĝojigajn rezultojn.

Ni esperu laborante kaj laboru esperante.

Esperanto -- Movado.

ENLANDA

— La Komerca kaj Industrta Ĉambro en Sofia donis al la Societo subvencion da mil levoj por bulgarlingva eldono de la protokoloj de l' Venezia konferenco.

G.-Orehovica. — Dum la jaro la fervora samideano Bogomil Radoslavov gvidis kursojn por lernantoj de la progimnazio. La kursoj finiĝis per ekzamenoj kun tre bona sukceso.

Dupnica. — Je 16 junio okazis la jarkunveno de la grupo „Suno". Elektita nova estraro: sekr.-kasisto. Ljubomir Ĉomakov, membroj: Todor Miĵorov kaj Ivan Badinski.

De Dupnica ni ricevis jenan Sciigon:

Regiona Instruista Societo „Hristaki Pavlovic“ Dupnica.

La regiona Instruista Societo en Dupnica „Hristaki Pavloviĉ“ en sia kunveno de 17 junio j. k. inter alie elaŭskultis s-on Ljubomir Comakov, kiu parolis pri la bezono de la internacia lingvo „Esperanto“ kaj tralegis la Manifeston de la Geneva Pedagogia Konferenco. Konsiderante la senteblan bezonon de internacia lingro kaj akceptante tre favore la alvokon de la internacia instruistaro, ni, la instruistoj de la nomita societo, unuanime decidis subteni kaj klopodi por la akceligo de Esperanto.

Dupnica, 17.VI. 1923.

Получихме от Дупница следното сжобшение:

Околийско Учителско Д-во „Хр. Павлович“ гр. Дупнийа.

Дупнишкото околийско учителско д-во „Христаки Павлович“ в сжбранието си на 17 т. м. между другото изслуша Любен Чомаков, който говори за нуждата от международният език „Есперанто“ и прочете манифеста на учителите от Женевската Педагогическа Конференция.

Схващайки осезателно тази нужда и приемайки с пжлна б.агосклонност апела на всесветското есперантско учителство, ние учителите от казаното дружество, единодушно решихме да подкрепим и ратуваме за преуспев. на есперантската идея.

Дупница, 17.VI. 1923.

ALILANDA.

Италия. В Падуа се водят два заджлжителни курса в Джржавния Тжрговски Институт.

В Удине, под покровителството на Народният Университет, в Джржавния Технически Институт са отворени два паралелни курса.

